

La Progreso

REDACTIE-
COMITÉ
G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per Jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC LEM JR
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

TERMINAROJ!!!

Ni, esperantistoj jam tiom kutimas fieri pri la perfekteco de Esperanto, ke ni ofte ne havas rigardon por ĝiaj malfortaj flankoj. Ili tamen ekzistas! La plej grava, ĉar tre ĝena, el ili estas la nesufiĉo da fakaj terminaroj. Konstante nia redakcio ricevas petojn pri konsilo, kiel traduki iajn vortojn. Pli ofte ni povas kontentigi la petintojn, sed, kiam temas pri fakaj terminoj, ankaŭ ni iafoje ne scias trovi la ĝustan vorton. La redakcio ne havas kompetenton pri ĉiaj terminologioj!

Sur scienca tereno tiu manko premas ne tiom forte, ĉar la sciencoj aplikas internacie terminologiojn, ĝenerale facile esperantigeblajn. Pli forte premas tiu manko sur tereno de teĥniko. En ĉiu fako de teĥniko, en ĉiu industrio oni uzas apartajn terminarojn, precipe nacilingvajn. Kaj neniu, kiu ne estas plene kompetenta pri iu fako, povas nek rajtas traduki aferon, objekton, ideon koncerne tiun fakon, ĉar, tamen farante tion, oni nepre kaŭzas miskomprenojn. Tradukadon de fakaj terminoj oni lasu al la fakuloj mem!

Sed la lingve kompetentaj personoj inter la fakuloj do zorgu, ke ni disponu pri iliaj terminaroj! Diversaj bonaj terminaroj jam aperis, sed la pli multaj el ili nuntempe estas ne plu aĉeteblaj. Post la milito I.E.L. eldonis serion da tiaj libretoj. Tre laŭdinde! Sed ne sufiĉas. Ni bezonas multe pli da tiaj teminaroj. Kaj krome oni reeldonu la jam elĉerpitajn, ĉar ankaŭ tiuj estis tre utilaj. Sed la utilo de neaĉetebla libreto estas negativa.

Ni komprenas, ke tiaj eldonoj postulas specialan zorgon. Ĝi estas laboro, tro multe lasita al privata iniciato, kaj eble pro tio ne sufiĉe efika. Utilan laborterenon ĉi koncerne havas la internaciaj organizoj I.E.L., S.A.T. kaj I.K.U.E., kiuj povus enketi en siaj mezoj pri kompetentuloj, pretaj kompili terminarojn, pri kiaj terminaroj sentiĝas plej forta bezono k.t.p.

L.P. jam modeste laboris en tiu direkto, de temp' al tempo publikigante listojn da tiaj terminoj, por plenumi la plej urĝajn bezonojn. Kaj ankaŭ la nova rubriko „Esperanto en la praktiko“ estas paŝo sur tiu vojo. Ni tamen bezonas multe pli: terminarojn por maŝinfakoj, fervojoj, konstrufakoj, terkulturo, diversaj industrioj, eĉ senkonsidere pri la diversaj sciencoj, kiuj ĉiu por si postulas terminaron.

POR KOMENĈANTOJ

H. Kuyt.

Vertalingen voor deze rubriek zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres, Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 5. Vertaal in Esperanto:

Het achtervoegsel „ig”.

Toen ik het boek terug kreeg, was het erg vuil; daarom maakte ik het schoon. Na het schoonmaken zag het er uit als nieuw. Mijn kleren waren zeer nat; ik droogde ze bij de kachel. Na het drogen trok ik ze aan. De oude vrek heeft een massa geld. Gedurende zijn gehele leven heeft hij het opgehoopt. Ieder heeft het recht om te stemmen. De regering machtigt hen daartoe. De spiegel hangt daar niet goed; hang hem ergens anders. Na één schot was de hond dood. Men doodde hem omdat hij dol (*rabia*) was. In die mooie streek ging de tijd snel voorbij. Wij brachten daar tien dagen door.

Vertaling van opgave 3.

Se dimanĉe¹⁾ estas bela vetero, ni promenas²⁾. Kutime ni forlasas la urbon, por admiri la belan naturon. Kiom³⁾ belaj⁴⁾ povas esti la arbaroj kaj la herbejoj⁵⁾. Ĉiam ni iras kvarope⁶⁾. Kompreneble ni parolas en⁷⁾ tiuj ĉi promenadoj nur Esperanton. Tre lernigaj⁸⁾ kaj agrablaj⁴⁾ estas tiaj⁹⁾ ekskursoj. Ni klopodas nomi ĉiujn¹⁰⁾ objektojn, kiujn ni vidas, en Esperanto. Ne ĉiam ni sukcesas¹¹⁾ en tio. Ni notas ĉiujn vortojn, por kiuj ni ne scias Esperanto-tradukon. Veninte hejmen¹²⁾, ni serĉas ilian Esperanto-nomon en vortaro¹³⁾. Tiujn vortojn ni ne facile¹⁴⁾ forgesas.

1) Niet: *dimanĉo*; hier moet men een bijwoord gebruiken of schrijven: *je dimanĉo*; laat men het voorzetsel *je* weg, dan krijgt *dimanĉo* als bepaling zonder voorzetsel een *n*. 2) Ook: *iras promeni*. 3) Niet: *kiaj*; in de nederl. zin heeft *wat* betrekking op *mooi*, moet dus een bijwoord zijn. 4) Niet zonder *j*; *belaj* noemt een kenmerk van meerdere zelfstandigheden. Als het zelfst. naamw. in het meervoud staat, zoals hier *arbaroj* kaj *herbejoj*, dan moet het bijbehorend bijvoegelijk naamw. ook in het meervoud staan. 5) Ook: *paŝtejoj*, als er gewoonlijk vee graast. 6) Niet: *po kvar*, wat *vier* *aan vier* betekent; er zouden er dus wel honderd kunnen zijn, die vier aan vier lopen. 7) Juister dan *dum*, waarmee bedoeld wordt: van het begin tot het einde der wandeling. 8) Ook: *instruaj*; niet: *lernemaj*; die wandelingen *doen* leren, dus: *igas lerni*; *lernema* = leergierig. Het nederl. achtervoegsel *zaam* wordt niet consequent toegepast, is dus niet altijd te vertalen met *em*; spaarzaam = *ŝparema*, bedachtzaam = *konsiderema*, maar moeizaam = *pene*; leerzaam is nu eens *lerniga*, dan weer *lernema*, bijv.: *tiu leciono estas lerniga*, maar: *tiu junulo estas lernema*. 9) Niet: *tiuj*; het nederl. woord *zulke* betekent *van dat soort*. 10) Niet: *ĉiujn*; hier wordt niet *alle soorten dingen* bedoeld. 11) Niet: *sukcesis*; als men vaak en hardop leest, komen dergelijke fouten niet voor. 12) Ook: *post kiam ni revenis hejmen*. 13) Niet: *vortaron*; hier is geen sprake van een richting, zoals in de zin: *mi metis la folton en la vortaron*. 14) Ook: *baldaŭ*.

Dem.: Pro kio iu grava gramatika verko nomas vortojn kiaj „kia, kiel, kie, tamen, sur kio, en kiu, kontraŭe, dume” k.t.p. konjunkcioj?

Resp.: Originaj konjunkcioj — inkluzive subjunkcioj — estas „aŭ, ĉar, kaj, nek, sed, se, jen... jen... , ĉu; kvankam, ke, kvazaŭ”. Krome ludas la saman rolon kunmetaĵoj kiaj „ĝis kiam (ĝis), dum kiam (dum), antaŭ ol, post kiam” k.t.p. Sed ankaŭ rilataj pronomoj kaj adverboj funkcias kiel konjunkcioj: „kio, kiu, kies, kie, kiel, kiam, en kio, sur kiu” k.s.

„Tamen, kontraŭe, dume” estas adverboj, ne konjunkcioj, sed ili povas ludi rolon kiel konjunkcioj (konjunkciaj adverboj).

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem.

Opgave 5 Vertaal in Esperanto:

1. Enige van deze meubels zijn beschadigd. 2. Een tweetal huizen werd door de brand vernield. 3. Toen zij de kinderen zo vrolijk zag spelen, zeide zij: wat is de jeugd (toch) gelukkig! 4. Toen ik de vrolijk spelende kinderen zag, moest ik lachen of ik wilde of niet. 5. Hij gedroeg zich als een onbeschaamde vlegel (*brutulo, malĝentilulo*). Ik begriip niet, dat hij zich niet schaamt over zijn gedrag. 6. Wees zo goed mij omtrent deze zaak nauwkeurig in te lichten. 7. Wij informeerden naar zijn gedrag en bekwaamheden en kregen (*ricevi*) een zeer bevredigend antwoord. 8. Bij gebrek aan petroleum ging de lamp uit. Wij hebben de lamp dus niet uitgedaan. 9. Hij stelde zich voor als een onzer vrienden. Stel u zo'n schurk voor! 10. Het verheugt ons u weer te zien; ga zitten en vertel ons iets van uw belevenissen. 11. Laat licht en lucht in uw woning toe; dat is gezond. 12. Ik dank u voor uw belangstelling; ik ben zo gezond als een vis.

Vertaling van opgave 4.

1. Ĉu vi povas kalkuli la areon kaj la perimetron de cirklo? 2. Oni neniam povas fidi senkarakterajn homojn (senkarakterulojn). 3. Konsiderante la cirkonstancojn, ni konsilas al vi singarde agi. 2. Ni petas al vi deponi ĉi tiun sumon konte de nia ĝiro. 5. Vi ne ŝtelu! Amikoj, nun bone atentul! Bonvolu iom flankenŝoviĝi. 6. Estas bela vetero, ni promenu kaj ĝuu la naturon. 7. Vi bone pripensu, ke tia entrepreno ne estas sendanĝera (senriska). 8. Responde al via letero ni sciigas al vi, ke ni postmandate sendos al vi la monon. 9. Mi certigas al vi, ke li faris ĉion eblan por sukcesigi la entreprenon. 10. Ni asekuris nin kontraŭ incendio (brulo) kaj rompŝtelo. 11. Ne hezitante la kuraĝa knabino (fraŭlino) saltis en la akvon kaj kaptis la dronanton; post kelkaj momentoj la saventino kaj la savito staris surborde (sur la bordo). 12. Neniu estas neeraripova; tiu, kiu laboras, faras erarojn, Konfesi ĉi tion ne estas honto. (La konfeso de ĉi tio ne estas hontiga.)

Dem.: Kio estas la ĝusta traduko por la metio de „fitter” (gasfitter, waterfitter, scheepsfitter)?

Resp.: Kvankam kelkaj vortaroj mencias „gasisto” por „gasfitter”, pli korekte ŝajnas al ni traduki per resp. „gasmuntisto, akvomuntisto, ŝipa muntisto”, analogie al „elektromuntisto”.

REDAKCIA KORESPONDO.

Al k-do N.H. en A.: Via artikolo pri „kvazaŭ” atingis nin tro malfrue por transpreni ĝian ĉefan ideon en nian vastan artikolon en la marta numero. Fina artikolo de la redakcio tamen ankoraŭ sekvas.

Kompreneble, vi rajtas preferi „plumbisto” super „lutisto” por „loodgieter”, ĉar analogiaj metionomoj kun la radiko „plumb” ekzistas en kelkaj lingvoj. Vi tamen ne kredis, ke ĝi estas pli korekta. Se iel eble, ni formu nomon de metiisto el la precipa laboro, kiun li faras, ne el la materialo, kiun li uzas. Ĉu „lignisto” estus klara por „timmerman”? Kaj ĉu „loodgieter” ĝenerale ne uzas pli da zinko ol da plumbo? Cetere, ni ne lasu nin tro gvidi de nacilingvaj tradukoj. En diversnaciaj Esp.-vortaroj oni ekzemple trovas „seruristo” por „machinebankwerker”, malĝuste, ĉar nuntempe tiu metio sin ĵam ne unuavice okupas pri seruraj laboroj.

Pri fakaj terminaroj ni estas same malkontentaj kiel vi. Legu nian ĉefartikolon.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het red.-adres, Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 8. Vertaal in Esperanto:

GODS VOETSPOREN.

Een Frans geleerde reed met enige Arabieren door de woestijn. Nooit verzuimde de hoofdman op bepaalde tijden van zijn kameel te stijgen en neer te knielen in het hete zand. Eindelijk op een avond, toen hij opstond van zijn gebed, kon de geleerde niet nalaten hem spottend te vragen: „Hoe weet gij toch zo zeker, dat er een God is?” Met verbazing zag de Arabier de geleerde een ogenblik aan en sprak toen ernstig: „Waardoor wist ik, dat er gisteravond een mens en een kameel langs mijn tent zijn gegaan? Zag ik dat niet aan het spoor in het zand?” „Ja, dat is nogal duidelijk”, was het antwoord.

Toen wees het kind der woestijn naar de zon, die haar laatste stralen over de eenzame wijde vlakte zond, en sprak op plechtige toon: „Zie daar een voetspoor, niet van een mens!”

Vertaling van opgave 4.

LA KRESKADO¹⁾ DE NIA ENLOGANTARO²⁾.

En 1870a Nederlando³⁾ nombris⁴⁾ pli ol 3½ milionojn⁵⁾ da enlogantoj, nuntempe⁶⁾ (antaŭ la milito) proksimume⁷⁾ 9 milionojn. Kiel ekestis tiu intensa⁸⁾ pligrandiĝo? Ne pro pligrandiĝo de la naskonombro⁹⁾. Kontraŭe: ĉi tiu malpli grandiĝis de po¹⁰⁾ 36 ĝis 21 vivantaj naskitoj en jaro el 1000 enlogantoj. La grava faktoro estas la mapligrandiĝo de la mortonombro. Ĉirkaŭ 1870a mortis¹¹⁾ meznombro po 26 el 1000 enlogantoj ĉiujare, nuntempe eĉ¹²⁾ ne 9. Plej frapa ĉe tio estas la mortonombro de la suĉinfanoj (mortoj antaŭ la unua jaro)¹³⁾, kiu de po 21 el 100 vivantaj naskitoj malpligrandiĝis ĝis iom pli ol 3.

La meza vivodaŭro de la viroj plilongiĝis¹⁴⁾ en ĉi tiu periodo de 38 ĝis 65 jaroj, tiu de la virinoj de 40 ĝis 66 jaroj.

En ĉio ĉi tio speguliĝas la progreso sur la tereno de la higieno¹⁵⁾.

Vertaling van opgave 5.

De propaganda ligt niet op de weg van ons tijdschriftje¹⁶⁾. Met de nieuwe wegen, die daarbij uitgedacht moeten worden, moeten¹⁷⁾ de organisaties zich bezig houden. Alleen voor wat de innerlijke zending betreft: versterking van het idealisme, van het gemeenschapsgevoel en vooral verheffing van ons eigen esperantistisch taal-peil, hebbén wij plichten.

L.P. Jan. '47.

1) Ook: *pligrandiĝo*. 2) Ook: *popolo*. 3) Niet: *Hollando*, wat oorspronkelijk alleen de provincies Noord- en Zuid-Holland aanduidt. 4) Ook: *havis* of *nombriĝis*; in het laatste geval echter zonder accusatief. 5) Natuurlijk niet in het enkelvoud, zoals in de tekst. 6) Beter dan: *hodiaŭ*, wat eigenlijk „vandaag” betekent. 7) Ook: *ĉirkaŭ*. 8) Ook: *supermezura*, *grandega*. 9) Ook: *naskiĝonombro*. Dit woord is echter onnodig langer. 10) „Po” staat voor de hoeveelheid, die per eenheid wordt bedoeld. 11) „Er” wordt niet vertaald. 12) Niet: *ankoraŭ*. 13) Niet: *sub la jaro*. 14) In de vorige zinnen betekende „stijgen”: groter worden. In deze zin echter: langer worden. 15) Minder elegant: *zorgado pri la sano*. 16) Ook: *is niet het terrein*. 17) De aanvoegende wijs komt in het Nederlands niet tot zijn recht.

Dem.: Kiel traduki „ijveren voor iets; iemand aannemen op de vertaling van; begrijpen uit de bewoording van de advertentie”?

Resp.: „Fervori por (pri) io; dungi iun laŭ la traduko de; kompreni el la esprimmaniero (vortordo) de la anonco”.

TRA NIA LITERATURO

FABIOLA.

Rakonto pri la katakomboj, de kardinalo Wiseman; el la angla tradukis E. Ramo¹⁾; dua eldono reviziita de Em. Robert. Kun artaj ilustraĵoj.

Historiaj romanoj kaj rakontoj formas ĝenerale tre ŝatatan literaturon. Epizodojn el la historio ili pentras pli vivaj kaj realaj pro la romanforme prezentitaj agadoj, precipe intrigoj de la rolantaj personoj. Realo kaj fantazio kuniĝas en tia senco, ke la dua havigas certan ĉarmon al la unua; kaj la leganto volonte akceptas ankaŭ la fantazion, sciante en ĝi kernon de vero.

„Fabiola” prezentas ion tute apartan. La historio ludas en tempo, dum kiu komencis malvolviĝi la tiam ankoraŭ juna kristanismo, poste ludanta tiom gravan rolon en la kultura historio de l' homaro. La romano estas vera majstroverko. Tiom pli bedaŭrinde estas, ke ekster rondoj katolikaj ĝi estas nur malmulte konata. Tion kaŭzas ĝia tendenco: katakombe-kristana, kiu el la vidpunkto de l' aŭtoro sinonimas kun katolika. Laŭ tio oni opinias la verkon speciale destinita por katolikoj, kio nia opinie ne estas ĝusta. Sendube ĝia tendenco estas katolika, sed nur pro tio, ke alian tendencon romano el tiuepoka Roma ne povas havi. Multaj dokumentoj el tiu grava tempo de l' batalanta kristanismo restis konservitaj al ni. Malgraŭ tio la diversaj kristanaj religioj, poste kreskintaj el la katakomba eklezio, nun havas sian propran koncepton pri tiu epoko.

Tro malmulte oni ĝenerale scias pri tiu unua tempo de l' kristanismo. Jam pro tio „Fabiola” estas leginda, ĉar instrua. Sed vera ĝuo fariĝas ĝia legado pro la simpla kaj tamen bildoriĉa maniero, laŭ kiu la aŭtoro prezentas la diversajn, ofte emocio-plenajn scenojn kaj dialogojn.

Pri la Esperanta traduko: se „Fabiola” estus originale verkita en Esperanto, la stilo ne povus esti pli bela, flua, internacia. La anglecon de l' originalo oni nenie sentas. Ĝenerale komprenataj metaforoj k.s. esprimoj plibeligas la stilon: *tiam eklumis al ŝi ideo* (ging haar een licht op) (55-29); *elkovi konspiron* (68-15); *forjuri* (afzweren) *sian religion* (70-22); *li volis iri sian vojon* (wilde zijn eigen gang gaan) (77-10), k.m.a.

Eĉ kun plej kritikemaj okuloj oni malfacile trovas frazkonstruon plibonigendan. Legante oni konstante admiras la lertecon de l' tradukintino, kiu sciis konstrui eĉ la plej komplikitajn frazojn en tia formo kaj kun tia vortaranĝo, ke ĉio legiĝas flue kaj kun tuja kompreno. Ĉe tio ni atentus du gravajn faktorojn: unue, ke ŝi malavare uzis participojn, sed tion farante nur pličarmigas sian stilon; kaj due, ke ŝi speciale konsideris ankaŭ facilan voĉlegeblon: ĉiujn frazelementojn ŝi sciis aranĝi tiom harmonie, ke nenie oni stumblas pro interproksimaj siblaj sonoj. Pri tio lasta multe pekas diversaj modernaj aŭtoroj.

Ankaŭ el gramatika vidpunkto la traduko estas korekta, ni preskaŭ dirus: perfekta. Certe, kritikokule oni povas trovi makuletojn, kiuj tamen facile kaŝiĝas sub la flua stilo, kaj kiujn ni prefere konsideru rezultoj de momentaj malatentoj de l' tradukintino ol kiel erarojn. Nur preterpase ni notu: *partopreni al*; *sufери de podagro* (75-21); *verema* (= tute vera) (31-25); *tie ŝi haltis, hezitanta (e)* (31-26); *ĝi estis egale (a)* (71-20); *senpacienco* (77-2); *amason de (da)* (30-28); neatenton pri kaŝita subjekto en la adjektivo *konforma* en: *li do serĉis aliajn rimedojn pli konformajn al sia (lia) karaktero* (66-34); forgeson de akuzativo en: *kaj li sciis, ke perfido signifus, por li, tuja(n) morto(n)* (71-20); *io, kiun (kion)* (67-28). Penseraro estas sendube antaŭ *nelonge* anst. *post ne longe* (80-10).

Notinde estas ankaŭ, ke en tiu ĉi traduko neniuloke reliefe esprimiĝas persone preferataj gramatikaj formoj. Ekzemple koncerne modon post *kvazaŭ* la tradukintino agas laŭ cirkonstancoj, ne lasante sin devigi de gramatikula regulo. Nur koncerne *ĝis kiam* ŝi agis nepre sisteme; nenie oni trovas *ĝis* konjunkcie uzita.

La sola riproĉebla nekonsekvenco estas, ke la personaj nomoj aperas en la libro jen tradukitaj: *Maksimiano, Torkvato, Korvino, Pankraco, Fulvio* k.c., jen en sia latina formo: *Calpurnius, Eŭrotas, Fabiola, Sira, Agnes, Diogenes* k.c. Cetere, intertekstajn latinajn nomojn kaj esprimojn klarigas subpaĝaj notoj.

La verko plene meritas esti vastronde legata. Kiel studmaterialo por B.-ekzameno ĝi estas nesuperebla.

¹⁾ Pseŭdonimo de s-ino M. Milson.

DE WERKWOORDEN

WEDERKERENDE WERKWOORDEN (REFLEKSIVAJ VERBOJ).

(Vervolg).

Met uitzondering van *aboni*, *imagi* en *memori* zijn deze werkwoorden in Esperanto onovergankelijk, d.w.z., zij kunnen noch *sin*, noch een ander lijdend voorwerp bij zich hebben. *Aboni*, *imagi* en *memori* kunnen wel een voorwerp hebben, maar dat is dan steeds iets anders dan het onderwerp zelf.

Zo is in het Nederlands in *ik abonneer mij op dat blad*, het voorwerp *mij*, omdat *zich abonneren* wederkerend is; in Esperanto is dat niet het geval en is het voorwerp *gazeton*: *mi abonas tiun gazeton*. Evenzo: *mi memoras tion* = *dat herinner ik mij*; *imagu tiun aferon* = *stel u die zaak eens voor*. Alleen *imagi* kan soms wederkerend gebruikt worden; het heeft dan werkelijk het onderwerp tot voorwerp: *li imagis sin en la ĉielo* = *hij verbeelde zich in de hemel te zijn* = *hij stelde zichzelf voor, dat hij in de hemel was*.

Het grote verschil tussen de nederlandse wederkerende werkwoorden naar betekenis en die naar de vorm is, dat de eerste zowel het onderwerp als een andere persoon tot voorwerp kunnen hebben: *hij scheert zich* en *hij scheert een klant*, *zij wast zich* en *zij wast het kind*, terwijl de tweede groep nooit een andere persoon tot voorwerp heeft: *hij vergist zich*, *gedraagt zich*, maar nooit: *hij vergist een ander*, *gedraagt een ander*.

3. Oorzakelijke werkwoorden.

Toch, zo zal men ons kunnen tegenwerpen, zijn er onder de genoemde wederkerende werkwoorden naar de vorm enkele, die men ook op een anderen persoon of een andere zaak kan toepassen, bijv.: *een ander abonneren op een blad*, *een ander ergens mee verblijden of verheugen*, *een ander verbazen*, *herinneren*, *vervelen*, *haasten*, *beklagen*.

Zeker, maar nu volgt wederom een moeilijkheid, die uit het Nederlands voortvloeit: *verblijden*, *verheugen*, *verbazen*, *herinneren*, *vervelen* enz., gebruikt in de betekenis van *een ander verblijden* enz., zijn niet dezelfde werkwoorden, die we hiervoor in een lijstje genoemd hebben; het zijn dan geen wederkerende, maar z.g. oorzakelijke werkwoorden, d.w.z., werkwoorden, die een werking uitdrukken, die de oorzaak is van een andere werking. Zo kan *verblijden* de oorzaak zijn van *zich verblijden*, *vervelen* van *zich vervelen* enz. En deze oorzakelijke werkwoorden hebben in het Nederland precies dezelfde vorm als de gelijknamige naar de vorm wederkerende werkwoorden, maar alleen de laatste worden door *zich* gevolgd. In Esperanto daarentegen zijn die oorzakelijke werkwoorden kenbaar aan de uitgang *igi*. Duidelijkheidshalve laten we hierna achter elkaar de betreffende werkwoorden in Esperanto volgen met daarnevens hun oorzakelijke vorm:

zich haasten	= rapidi (hasti)	haasten	= rapidigi (hastigi)
„ herinneren	= (re)memori	herinneren	= (re)memorigi
„ verbazen	= mir(eg)i	verbazen	= mir(eg)igi
„ verblijden	= ĝoji	verblijden	= ĝojigi
„ verheugen	= ĝoji	verheugen	= ĝojigi
„ vervelen	= enui	vervelen	= enuigi
„ verwonderen	= miri	verwonderen	= mirigi

Nu komt er wederom een kleine moeilijkheid: de werkwoorden van de tweede groep, de oorzakelijke, kunnen ook wederkerend gebruikt worden: *ĝojigi sin*, *rapidigi sin*, *mirigi sin* enz. *Ĝoji* n.l. is *zich verheugen*, *blij zijn*, *vreugde gevoelen*, zonder meer, terwijl *ĝojigi sin* betekent *zichzelf vreugde bereiden*, *zich ergens mee blij maken*. *Ĝojigi* is dus de oorzakelijke vorm van *ĝoji*, evenals *sidigi* die is van *sidi*. Een voorbeeld ter verduidelijking: *Hodiaŭ mi ĝojigis min per nova libro* = *Vandaag heb ik mezelf met een nieuw boek verheugd*.

En wat *een ander abonneren* betreft, dit is een bijzonder geval. In het Nederlands is *zich abonneren* wederkerend naar de vorm, als bedoeld wordt, dat men zich ergens op abonneert voor zichzelf. Maar niet wederkerend is het, als men een abonnement neemt voor een ander. De Esperanto-vertalingen maken dit geval duidelijker:

Ik abonneer mij op dat blad = *Mi abonas tiun gazeton*.

Ik abonneer hem op dat blad = *Mi abonas tiun gazeton por li*.

In de eerste zin eist de Esperanto-zin dus niet de toevoeging *por mi*. (Slot volgt).

TEMPINDIKAJ KONJUNKCIOJ

Ekzistas esperantistoj, precipe inter recenzantoj, kiuj kutimas sin puŝi kontraŭ samaj kritikeblaĵoj (ne ĉiam kritikindaĵoj!). Ĉe tio ili ne atentis, ke pri pluraj gramatikaj formoj en Esperanto ne decidas leĝo; ke koncerne ilin ĉiu kompetentulo rajtas apliki sian preferatan solvon, kondiĉe ke li ne tuŝu la fundamentajn principojn. Ne tro facilanime oni nomu erara tion, kio kontraŭas la propran opinion!

Unu el tiaj sinpuŝigaj kaŭzoj estas la uzo de *ĝis kiam*, kaj precipe de *dum kiam* anstataŭ *ĝis*, respektive *dum* por la konjunkciaj signifoj (nederlande: *totdat* kaj *terwijl*).

Kiun motivon oni havas por malaprobi tiujn formojn? La fakton, ke Zamenhof ilin ne uzis, almenaŭ ne *dum kiam*? (Ĝiam kompetentulo diris malkaŝe, ke li agnoskas la logikecon de *dum kiam*, sed ne uzas ĝin nur pro tiu fakto). En „Plena Gramatiko” punkton! Tio lasta estas erara; *kiam* povas signifi ankaŭ daŭron, kion pruvas amasoj da ekzemploj en la literaturo, ankaŭ de Zamenhof! Okaze ni eksciis pri alia argumento kontraŭ uzo de *dum kiam*: la formo estus... naciismo. Ni scivolus pri la nacia lingvo, el kiu *dum kiam* originas! Se *dum kiam* estus naciismo, ĝi estus same ofte uzata kiom aliaj tempindikaj konjunkcioj (vidu poste en tiu ĉi artikolo), nedepende de tio, ĉu logike aŭ ne. Sed male, naciismo estas la prepozicio *dum* por konjunkcia signifo (nederl. *terwijl*). Kaj ni estas certaj, ke, se Zamenhof mem ne estus uzinta *dum* kun tiu senco, sed *dum kiam*, neniu esperantisto sin puŝus kontraŭ *dum kiam*, do fidele kaj obee imitus tiun formon de la Majstro.

Por pruvi la korektecon de la kritikitaj formoj ni devas rigardi ilin kiel apartenantajn al speciala grupo da konjunkcioj, kiu indikas la tempajn rilatojn inter du agoj.

Se iu ago okazas precize en la sama momento de alia ago, ni uzas la konjunkcion *kiam*, kiu do esprimas samtempecon. Por pliprecizigi tiun fakton ni povas diri *ĝuste kiam*. Por akcenti ĝin: *nun kiam*.

Se inter la du agoj ekzistas diferenco de tempo, oni devas aldoni tempan prepozicion: *antaŭ kiam* aŭ *post kiam*. Se la tempa diferenco estas nur eta, oni diras: *tuj kiam*. La simpla formo *kiam* tamen ne indikas, ke la unua ago daŭras same longe kiom la dua. Samlongeco ekzistas en: *Mi aŭskultis, kiam li parolis*; ĝi ne ekzistas en: *Li vizitis nin, kiam mi ne estis hejme*. En la dua frazo *kiam* signifas *en la tempo, dum kiu* (nederl.: *terwijl*).

Tiu sama nederlanda vorto tamen ofte signifas *ne en la tempo, sed dum la tempo*, el kio pruviĝas, ke *kiam* senpli signifas *ne la saman, kiam dum kiam* (= *ne en, sed dum la tuta tempo*). *Dum* kaj *kiam* do ne estas sinonimoj. Kaj, ĉar la vorto *dum*, same kiel aliaj tempaj prepozicioj (*en, post, antaŭ*) postulas komplementon (*dum io, en io, post io*), ĝi postulas tian komplementon ankaŭ en signifo konjunkcia (*dum kiam, antaŭ kiam, post kiam*). La aserto, ke *dum kiam* estas pleonasmo do estas senbaza.

La naciaj lingvoj havas apartajn vortojn por la tempindikaj konjunkcioj, neniel formantajn simetrian tuton. Evidente ĝuste el tio rezultis la diversformaj tradukoj, ne montrantaj ilian logikan parencecon. Tiu logika parenceco tamen estas facile esprimebla en Esperanto. Oni komparu la ĉi subajn tradukojn de la respektivaj nederlandaj vortoj:

nederlande:	kutimaj formoj:	logikaj formoj:
<i>toen</i>	<i>kiam</i>	<i>kiam</i>
<i>juist toen</i>	<i>ĝuste kiam, ĵus kiam</i>	<i>ĝuste kiam</i>
<i>nu, terwijl, nu dat</i>	<i>nun kiam, nun</i>	<i>nun kiam</i>
<i>voordat, alvorens</i>	<i>antaŭ ol, antaŭ kiam</i>	<i>antaŭ kiam</i>
<i>nadat</i>	<i>post kiam, post ol¹⁾</i>	<i>post kiam</i>
<i>zodra</i>	<i>tuj kiam, baldaŭ kiam</i>	<i>tuj kiam</i>
<i>sinds</i>	<i>post kiam, de kiam, ekde, de post</i>	<i>de kiam</i>
<i>terwijl</i>	<i>dum, kiam, dum kiam, dum ke</i>	<i>dum kiam</i>
<i>totdat</i>	<i>ĝis, ĝis kiam, ke, antaŭ ol</i>	<i>ĝis kiam</i>
<i>zo lang als</i>	<i>tiel longe ĝis, ĝis, dum, ĝis ne, tiel longe</i>	<i>tiom longe kiam²⁾</i>
	<i>kiel</i>	
<i>zo vaak als</i>	<i>tiel ofte kiel, tiel ofte ĝis</i>	<i>tiom ofte kiam²⁾</i>

¹⁾ Analogie al *antaŭ ol*, proponita de R. de Saussure.

²⁾ Respektive ankaŭ *tiom longe kiom* kaj *tiom ofte kiom* pro la komparativa ideo *tiom kiom*.

TRA NIA LITERATURO

LA VIVO DE L' ESKIMOJ.

Prof. Agostinho da Silva. Tradukis el la protugala M.F.

La titolo jam indikas la enhavon de la libreto. Ĝi konigas al ni interesaĵojn pri la eskimoj kaj iliaj moroj. Kelkaj fotoj pliklarigas la tekston. Kiam oni interesiĝas pri fremdaj popoloj, oni trovas en ĉi tiu 26 paĝa libreto sciindajn aferojn. Kvankam la frazoj ĝenerale estas sufiĉe facile kompreneblaj, ni bedaŭras, ke la tradukinto (kaj tio validas ĝenerale por ĉiuj verkontoj kaj tradukontoj) ne metas sian verkon sub la juĝon de iu kompetenta instanco por eviti la diversajn nekorektaĵojn.

Ni plurfoje renkontis „je”, kie ĝi estas anstataŭigebla per pli bona prepozicio: *dividiĝas je (en)* (5); *devigas je (al aŭ -n)*.

Kial la diferencaj formoj en la participoj pasivaj, indikantaj staton: *la popoloj estas nomataj* (5); *la tero estas kovrita* (5)?

Ĉu la tradukinto ne solvis por si mem la problemon pri „kvazaŭ -us (-as)”? *Kvazaŭ ili manĝus* (21); *kvazaŭ li mortis* (24).

Gramatikaj eraroj estas ekzemple: *la okuloj estas nigraj, iom simile al* (6); *apartigite staras alia tendo* (8); *la eskimoj uzas saman procedon kiel mi* (10).

En nia lingvo ekzistas multaj „elastaj” vortoj, kiuj trovi en la literaturo nur singardan aplikon. Oni anstataŭigu ilin per pli „intensaj”: *fari (konstrui), estas (ekzistas), estigita de (kaŭzita de), eniĝi en (penetri en)* k.t.p.

Cetere, la libreto estas bona, kvankam ne impresa.

J. van Scheepen.

ATENTU!!!

Sur la frontpaĝo de la aprilo numero enŝoviĝis eraro: oni legu: postgiro 331133, do ne: 113311.

Dem.: Mi ne povas ne kritiki la (laŭ mi sensencan) refuton de la mallongigo „k” por „kaj”, ĉar ĝi estus malbela. Temas ja nur pri alkutimiĝo. En la plej multaj eŭropaj lingvoj tiu vorto konsistas el nur unu aŭ du literoj. Por mia sento „kaj” estas relative longa vorto.

Resp.: Nia opinie la uzo de „k” estas unu el la plej sensencaj eltrovoj en la skribado de nia lingvo. Spacon oni ne ŝparas per ĝi. Ĝi pli malbeligas la tekston ol plej ofta uzado de „kaj”, kaj via pledo, ke ĝi anstataŭas relative longan vorton, ne valoras koncerne elparolon, ĉar oni tamen devas elparoli „kaj”. Unuliteraj vortoj konvenas nur, se ili ekzistas tiaj en la lingvo, kiel ekz. „k, s, v, z” en la ĉeĥa lingvo. En Esperanto tiaj neelparoleblaj etaj monstroj ĝenas la leganton. Krome ĝi rompas la regulon pri punkto post mallongigo. Feliĉe preskaŭ neniu serioza Esperanto-gazeto uzas plu tiun kripligon, kaj en korespondado ĝi preskaŭ neniam renkontiĝas.

Tiu ĉi listo montras, ke la praktikaj Esperanto-formoj prezentas veran haoson, supozeble pro tio, ke ne ĉiu konvinkiĝis pri la simetrio de la logikaj tradukoj. Defendantoj de *dum* kaj *ĝis* anstataŭ *dum kiam* kaj *ĝis kiam* pretendas, ke *dum* kaj *ĝis* en tiaj esprimoj ne estas prepozicioj, sed konjunkcioj. Fakte tamen estas, ke la naciaj lingvoj tiokoncerne prezentas haoson, neimitindan en Esperanto. Kaj kial do la *dum-ĝis-emuloj* ne konsekvence skribas ankaŭ *post* anstataŭ *post kiam* kaj *nun* anstataŭ *nun kiam*? Se tion ili farus, klare montriĝus ilia malpravo, ĉar la prepozicio *post* kaj la adverbo *nun*, uzataj kiel konjunkcioj, nepre kaŭzus miskomprenojn.

Pri la nederlanda vorto *terwijl* ni aldonu, ke ĝi tamen ne ĉiam havas signifon de tempo. Ofte ĝi indikas kontraston, kaj estas nederlande anstataŭigebla per *ofschoon* aŭ *evenwel*, kaj tradukebla per *kvankam*: *Waarom hebt u dat gedaan, terwijl (kvankam) u heel goed wist, dat...*

Krome *terwijl* havas ankoraŭ alian signifon, ne klare esprimeblan en Esperanto, ekzemple en la frazo: *Alle voorzetsels hebben een bepaalde betekenis, terwijl het voorzetsel „je” geen bepaalde betekenis heeft.* En tiaj kazoj K. Minor iam proponis *dum ke*, kio ne estas ĝusta, ĉar la vorto *dum* estas uzebla nur en tempa signifo, kaj ne kombinebla kun la subjunkcio *ke*. En tiaj kazoj ni proponas traduki per *escepte de, sed, tamen, kontraŭe* aŭ, se la signifo tro paliĝis, eĉ per *kaj*.